

# UKRAINA

Gazeto de Ukrainia  
Esperanto - Asocio

No 1

1994

*Stelo*







**Estimata sinjor(in)o!**

Ĉu vi jam scias pri niaj novnaskitoj? Ankoraŭ ne?  
Do, bonvolu konatiĝi!

Naskiĝis en Ukrainio du infanoj, unu post la alia: **Ueebko** kaj **Ukrastelo**. Tio estas la karesnomoj, kiuj oficiale sonas jene: Ukraina Esperanto - eldonejo "**Bona koro**" /naskiĝis novembre 1993/ kaj gazeto de UkrEA "**Ukraina stelo**" /naskiĝis junio 1994/. La baptifesto ankoraŭ ne okazis!

Ni invitas vin fariĝi la honora baptopatr(in)o!  
Ne prokrastu vin anonci!

La novnaskitoj havas grandan, sed dume ne komfortigitan domon - Esperanto - centron en Drohobyč (400 kv. m.).

Vi decidis partopreni baptifeston? Jes?

Ni atendas vian geston:

- nacian ornamaĵon aŭ ludilon /por ornami la ĉambrojn/;
- Esperanto - libron por la kolektata biblioteko;
- vian verkon /foton, bildon, metiaĵon/ k.t.p.



Ion tian vi povas sendi aŭ transdoni persone dum la baptifesto, okazonta en la kadro de la internacia E - renkontiĝo "Ĉekarpata aŭtuno". Se vi ne havas por tio tempon, la novnaskitoj ĝojos ankaŭ pro "konvertebla bombono", sendita en koverto aŭ pere de UEA /kodo ĉe UEA - **ueeq** - Ukraina Esperanto - eldonejo/.

Feliĉa patro  
Vasyl Stanovyč,  
prezidanto de la UEE "Bona koro",  
ĉefredaktoro de "Ukraina stelo".

293720, Drohobyč  
Lviv regiono  
str. P.Orlyka, 3 A

Tel: (03244) 2-23-48

Tel - fakso (03244) 3-82-95





# "Ukraina stelo"

trimonata gazeto pri Ukrainio kaj  
Esperanto

UEA - kodo: **ueeq - t**

Fondita de Vasyl Stanovyč 4 - an de  
majo 1994

Registrita numero: LV N147

Eldonata de Ukrainia E - eldonejo "Bona  
koro"

Eldonkvanto 5.000 ekzempleroj

Sendata al abonantoj, UEA - deligitoj,  
E - instancoj

Ĉefredaktoro: Vasyl Stanovyč

Literatura redaktoro: Volodymyr Pacjurko

Pentristo: Niko Voloŝyn

Fotisto: Ihor Fecjak

Komputistoj : Oksana Ladanaj, Mukola

Poŝtoĝaj

Abonprezo: 30 guldenoj por unu jaro  
Proveksemplero estas senpage ricevebla  
Artikoloj kun aŭtora foto kaj biografio  
bonvenas

Pri la enhavo de artikolo respondas la  
aŭtoro mem

Adreso: UKRAINIO UA - 293720

Drohobyč. Lviv regiono,  
str. P. Orka 3 A

Telefono: +/03244/ 2 - 23 - 48

Telefakso: +/03244/ 3 - 82 - 95

"Українська зоря"

Головний редактор, засновник і

видавець Василь Станович

Журнал зареєстровано Львівським

управлінням по пресі

Свідоцтво серія ЛВ № 147

Мова есперанто, обсяг видання 2 друк.

аркуші

Тираж 5000 прим.

## ENHAVO

V.Stanovyč. De l' duonutopiaj revoj - ĝis la konkretaj paŝoj _____	3
S.Milojevič. Salutletero. _____	5
Ukrainio sur la mapo de Eŭropo _____	6
Poŝtmarkoj de la suverena Ukrainio _____	7
M.Ŝalata. Elstara ukraino de renesanco - epoko _____	8
Ĉu Karpatia Ligo? _____	9
Vilaĝo en kiu naskiĝis titano _____	10
"Ĉekarpata aŭtuno" _____	12
La Doŭbuŝ - rokoj _____	14
Počopo. Vertepo _____	16
"La mondo estis kaptanta min, sed ne kaptis"... _____	18
V.Pacjurko. Ukrainaj verkistoj en la esperanto - movado _____	20
N.Voloŝyn. La ekspozicio marŝas tra la mondo _____	22
E.Kovtonjuk. Pri nia movado skize _____	23
Kongreso de UkrEA _____	24
Novaj kursoj _____	25
Atenton! _____	26
Tradiciaj E - renkontiĝoj en Ukrainio _____	27
Ĉu vi scias, ke? _____	28
Korespondi deziras _____	30
Monumento de Zamenhof _____	31


### Estimata leganto!

Por nia redakcia skipo tre grave estas  
eksciĝi Vian opinion kaj konsilon pri la  
gazeto, pri la artikoloj kaj enhavo.  
Bonvenas kaj havos prioritaton ĉiuj  
reagoj, recenzoj kaj anoncoj.

Frontpaĝo: Ripozejo Majdan, kie  
okazos E - renkontiĝo "Ĉekarpata  
aŭtuno".

Lastpaĝo: Karpata rivereto ĉe  
ripozejo Majdan.

Журнал видруковано у Стрийській  
міській друкарні. Зам. № 1656:



## DE L' DUONUTOPIAJ REVOJ - ĜIS LA KONKRETAJ PAŜOJ

Foje mi meditis pri mia vivo. Ŝajnis, ke mi atingis ĉion bezonatan en ĝi: konvenan laboron, reputacion de honesta ĵurnalisto, redaktoro kaj eldonisto de la bonfara gazeto "Bona koro". Normalaj rilatoj en la familio, kun subordigitaj kaj kolegoj. Tamen mi sentis, ke io mankas al mi. Kaj subite mi trovis la kaŭzon de malkomforto - mankas al mi Esperanton. Jes, ĝuste Esperanto, dank' al kiu mi travivis la plej belajn momentojn en la vivo. Kaj mi revenis en Esperantujo, al kiu mi membriĝis en la malproksima 1959 estinte simpla konstruisto.

Kvankam mi neniam aktivis grandskale, mia naturo transprenis multajn esperantistajn trajtojn: ardan deziron propagandi la lingvon, gvidi kursojn, tutmonde korespondi, tendarumi, renkontiĝi, k.t.p., kaj, certe, revii. Tre ofte tiuj revoj estis tute ne realigeblaj, utopiaj, same kiel la revo pri l' "fina venko". Sed revnarkotaĵo fortas, logas, tentas...

Disfalas Sovetio. Ukrainio reakiris sendependecon. Forvaporiĝis iluzioj, restis vera bildo de nia mizerega vivo. Al miloj de ekonomiaj problemoj aldoniĝis same multnombraj spiritaĵoj. Unu el ili - Esperanto kaj ne tre rezulta aktivado de nemultaj personoj, kiun oni kutimas nomi pompe movado.

Kiel difini la problemojn de la internacia lingvo por la postkomunisma lando, kiel aktivigi nian agadon, ke ĝi konformu al la vorto "movado"? Pri tio ni diskutis en konferencoj, babilis en amika rondo. Dum oni serĉadis monon, subtenantojn, min pli kaj pli turmentis duboj: kial ne mi estu unu el tiuj subtenantoj? Mi ja havas ion plian, ol aliaj entuziasmuloj: privatan gazeton, ejon por redakcio, ioman kvanton da papero, kaj kio ne malpli gravas, sperton de eldonlaboro. Kial surbaze de ĉio ĉi ne fondi nian, ukrainian Esperanto - eldonejon?..

Amikoj forigis miajn dubojn, la propono estis akceptita unuanime, preskaŭ aklame. Estis decidite, ke la eldonejo funkcios sub la aŭspicio de UkrEA kaj aperigos instrumentodikan, beletran kaj informliteraturon en la internacia lingvo Esperanto.

Priparolante la aferon kun samideanoj pli profunde, ni komprenis, ke ĝi ne sukcesos, sen la propra poligrafia bazo. Ni trovis kelkajn patronojn, turnis nin perletere al la



tutmonda esperantistaro apogi nian entreprenon. En la gazeto "Bona koro", aperanta de tiu ĉi jaro kajeforme sur 48 paĝoj de la formato A-4, ni lanĉis la porinfanan korespondan E - kurson en la ludstila maniero "Vojaĝo al Esperantujo, aŭ kiel du geamikoj kaj la kateto Marko lernis la mirindan internacian lingvon".

Kaj jen la unuaj sukcesoj. Aperis la ukrainlingva "Ŝlosilo de Esperanto" (10 mil ekz.), estas preparataj por presado legolibro por komencantoj kaj ukraina - Esperanta vortaro. Ricevinte modestan monapogon de patronoj, mi ankoraŭ prenis krediton de banko, dank' al kio aĉetis komputeron kaj du presmaŝinojn.

La urba konsilantaro de Drohobyĉ luigis al la eldonejo favorpreze grandan unuetaĝan ejon, kun la areo 400 kv.m. en la partero de kiu post negranda rekonstruo kaj riparlaboroj eblos loki presejon kaj en la unua etaĝo - la redakcion kaj E - cetron. La domo situas en la urbocentro, antaŭ ĝi estas granda skvaro. La riparlaboroj baldaŭ finiĝos.

Oni diras, ke apetito venas dum manĝado. Ĝuste tiel venis ankoraŭ unu aŭdaca ideo - reaperigi la gazeton "Ukraina stelo", la unuan numeron de kiu vi tenas en la manoj. La gazeton sub tiu titolo eldonadis unu el la pioniroj de la E - movado en Ukrainio Orest Kuzma. Dum 1913 - 1923 (kun paŭzoj) aperis 26 numeroj de la gazeto. Ĝi grave kontribuis al popularigo de la ukrainaj historio, literaturo kaj kulturo.

En 1991 la kvaropo de aktivuloj (Volodymyr Pacjurko, Viktor Pajuk, la fratoj Lukaŝidoj) sukcese "revivigis" la gazeton (bedaŭrinde nur por unu jaro, ĉar la tiama UkrEA - estraro ne povis aŭ ne volis trovi la monapogon por ĝi). En la dua periodo estis aperigitaj 8 modestaj laŭ aspekto, sed vere riĉaj laŭ enhavo numeroj.

Do, "Ukraina stelo" eniras sian trian periodon. Stiros ĝin la redakcia teamo, kiun konsistigas aktivuloj de la antaŭa periodo kaj novaj homoj. En la unua numero de la gazeto vi trovos multajn informojn pri la okcidentukraina regiono kaj urbo Drohobyĉ, kie ni planas ĉi - aŭtune organizi la duan internacian E - renkontiĝon "Ĉekarpata aŭtuno". En postaj numeroj ni penos daŭrigadi bonajn tradiciojn de la gazeto.

Karaj legantoj! Ni esperas, ke al vi plaĉos nian gazeto, sed necesus vian aktivan kunlaboron, moralan kaj laŭeblejan financan subtenon. Ŝajnas ke nia ideo disvastigi Esperanton trovos vian animan, bonkoran komprenon.

Ni invitas vin al legado kaj kunlaboro.

Vasy! STANOVYĈ  
ĉefredaktoro kaj eldonisto





## UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko

Centra Oficejo: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam,  
Nederlando

Telefono +3110 436 10 44 / 436 15 39 Telefakso +3110  
436 17 51



Al:

Ukrainia Esperanto - Asocio

Dato: 1994 05 18

Karaj geamikoj,

Hodiaŭ vizitis la Centran Oficejon de UEA s-ro Vasyl Stanovyč, sendube unu el la plej vervaj aktivuloj de via Asocio. Miaj gekolegoj kaj mi ĝojis aŭdi, ke la Esperanto - movado en via lando ne dormas atendente, ke iel solviĝu la grandaj ekonomiaj problemoj, kiujn frontas ne nur UkrEA, sed ankaŭ ĉiuj landaj asocioj en orienta Eŭropo. Vi agas kaj vi mem serĉas solvojn de viaj problemoj. En tia situacio helpas ankaŭ la solidareco, kiun per siaj kontribuoj montras la tutmonda esperantistaro pere de donacoj kaj donacetoj por subteni viajn eldonajn planojn.


\* Mi deziras gratuli al vi pro la eldono de la "Ukraina ŝlosilo de Esperanto" kaj mi esperas, ke ĝi montriĝos esti nur la unua ero en longa vico de sukcesaj Esperanto - eldonaĵoj en via lando.

\* Ni aparte bonvenigas viajn planojn revivigi la iaman revuon "Ukraina stelo" en amplekso kaj preskvalito superaj eĉ al nia revuo "Esperanto". Ni tamen ne rigardas tion kiel "konkurencon" al nia revuo, sed kiel komplementan periodaĵon en mondoparto, kiun nia revuo apenaŭ atingas pro la malsupereblaj ekonomiaj baroj. Kun multaj bondeziroj por via utila agado, amike salutas,

\* Simo Milojević,  
ĝenerala direktoro de UEA



## UKRAINIO SUR LA MAPO DE EŬROPO



La grandega imperio, nomata USSR, en 1991 disfalis. Sur la mondmapo aperis pluraj sendependaj ŝtatoj. La 24 - an de aŭgusto estis deklarita la sendependeco de Ukrainio.

Ukrainio estas granda laŭ la teritorio kaj potenco pro ekonomiaj riĉofontoj eŭropa ŝtato. Ĝia teritorio estas 603700 v.km, loĝantaro - pli ol 50 milionoj da homoj (ni komparu por ekzemplo kun Francio, kiu havas 551000v.km kaj pli ol 50 milionoj da loĝantoj).

La plimulto de loĝantaro estas ukrainoj (pli ol 37 mln). El la naciminoritatoj plej grandas rusoj (pli ol 11 mln), ilin sekvas laŭnombre hungaroj, poloj, rumanoj, judoj, gagauzoj, tataroj, grekoj, ciganoj k.a. La ŝtata lingvo estas la ukraina. La ĉefurbo de Ukrainio estas Kyjiv (esperantigita formo - Kievo), kiu situas sur la bordo de la rivero Dnipro. Administre Ukrainio konsistas el 24 provincoj kaj Krimea aŭtonoma respubliko.



La ŝtata flago estas blua - flava. La ŝtata blazono estas tridento, la ŝtata himno - "Ankoraŭ ne mortis Ukrainio".

La plej disvastigita religio en Ukrainio estas kristanismo kun diversaj konfesioj (ortodoksa, grekkatolika, romkatolika, evangelistaj, adventistaj k.a.), Ekzistas ankaŭ aliaj religioj, diversaj sektoj.

La popolo, kiu loĝas sur la ukraina tero, havas sian antikvan kaj brilantan historion. Ankoraŭ du - tri miljaroj antaŭ Kristo ĉi tie loĝis multaj gentoj, okupiĝantaj pri terkultivado kaj brutobredado, scipovantaj fari fajnajn juvelojn kaj ceramikaĵojn. La plej interesaj el ili estis trovitaj dum la arkeologiaj prifosoj apud Trypilla, tial ankaŭ la epoko ricevis la nomon de tripila kulturo. Ĝuste en tiu antikva tempo sur la bordaj de Dnipro

aperis la unua skribo. Ĝiajn literojn poste transprenis la antikvaj fenicioj kaj post ili ankaŭ helenoj.

La sorto de ukraina ŝtato de la ekzistkomenco mem dependis de ĝia geografia situo. La ukraina tero nemalofte iĝis fortikaĵo por la Okcidenta Eŭropo en la batalo kun ruinigaj hordaj invadoj, kiuj frakasigis kontraŭ la ŝildoj kaj kapoj de la ĉednupra loĝantaro, kaj pro tio multfoje saviĝis la eŭropa civilizo.

Ukrainio dume ne havas sian konstitucion. La ŝtato estas gvidata de la parlamento (la Supera Konsilio de Ukrainio) kaj de la prezidanto.

La sendependecon de Ukrainio agnoskis ĉirkaŭ 150 ŝtatoj de la mondo.

### Angulo de kolektanto

## POŝTMARKOJ DE LA SUVERENA UKRAINIO



Пошта України



Пошта України



ПОШТА УКРАЇНИ



ПОШТА УКРАЇНИ

Necesis unu jaro, por ke post proklamo de la ŝtatsdependeco aperu la unuaj poŝtmarkoj.

Sur unu el ili ni vidas la ukrainajn ŝtatsimbolojn - flagon kaj blazonon. Sur la dua ni vidas reprezentatojn de la glora ukraina kozakaro, la poŝtmarko estas dediĉita al ĝia 500 - jariĝo.

Inter la unuaj markotemoj estas ankaŭ Olimpikoj, 60 - a datreveno de la granda malsato en Ukrainio, Pasko k.a.



## ELSTARA UKRAINO DE LA RENESANCO - EPOKO

Ĉiu urbo havas en sia historio homojn, kiuj ĝin grave famigis, pri kiuj ĝi fieras.

Se diri pri Drohobyĉ, la urbo kun la proksimume miljara historio, verŝajne famigis ĝin plej frue Jurij Kotermak, konata sub la patriota pseŭdonimo Drohobyĉ. Samtempe li famigis la gepatran Ukrainion kaj, certagrade, la tutan Slavujon.

Li estis la unua fama ukraina scienculo de la eŭropa skalo.

Naskiĝis Jurij Kotermak proksimume en la jaro 1450 en la malriĉa metiista familio. Klerigon li akiris en malfacilaj kondiĉoj, komence en Drohobyĉ, poste en Lviv, kaj de 1468 en la Krakova universitato. Ĉi tie li akiris la bakalaŭran kaj poste la magistran titolojn.

Baldaŭ li famiĝis kiel aŭtoritata prognozisto de la atmosferaj fenomenoj. Bone erudita pri astronomio (pli ĝuste, verŝajne, pri astrologio) atentanta la naturon, Jurij el Drohobyĉ kun granda precizeco, interalie por diversaj lokoj, antaŭvidis la tempon de la sun - aŭ luneklipsoj, klarigis iliajn sekvojn.

En 1478 - 1482 Kotermak instruas astronomion kaj samtempe daŭrigas la medicinistudojn en Italujo, en la Bolonja universitato (li venis ĉi tien en 1474), akiras ĉi tie la gradon de la doktoro pri arto kaj medicino.

En la tempo, kiam Italujo famiĝis pri la Renesanco - titanoj, en la epoko de la granda Leonardo da Vinci. Jurij Drohobyĉ estis elektita rektoro (1481) de la plej malnova en Eŭropo Bolonja universitato.

En 1483 aperis latine lia libro "Prognoza



taksado de la kuranta jaro 1483 de Georgius Drohobyĉ el Rusjo, doktoro de filozofio kaj medicino de Bolonja universitato". Mirigas la vasta problemaro, kiun tuŝas en ĝi la scienculo. Ĉi tie estas plendoj pri senfinaj militoj, turkaj invadoj kaj konstato de la socia maljusto, kaj antaŭdiro de epidemioj, kaj konsiloj, kiel kontraŭstari ilin.

En la libro unufoje en la historio de presado estas menciitaj la ukrainaj urboj Lviv kaj Drohobyĉ, indikitaj iliaj geografiaj longitudoj. La libro "Prognoza taksado..." alportis al la aŭtoro meritan gloron en la scienca mondo.

Reveninte al Krakovo (en 1486 aŭ 1487), Jurij Drohobyĉ, kiel en Bolonjo, multe okupiĝas pri la medicina praktiko, kuracante kiel senmonulojn, tiel ankaŭ la polan reĝon mem.

Li estis unu el la rektoroj de la ne-malpli fama Jagellona universitato, kie instruis astronomion kaj medicinon. Oni asertas, ke liajn lekciojn aŭskultadis Mikolaj Kopernik. Jurij Kotermak - Drohobyĉ mortis en Krakovo en 1494 kaj estis tie enterigita.

Prof. Myhajlo Ŝalata



## ĈU KARPATIA LIGO?

Antaŭnelonge la prezidanto de la Ukraina E - eldonejo "Bona koro", ĉefredaktoro de "Ukraina Stelo" Vasył Stanovyč renkontiĝis kun s - ro inĝ. Milan ZVARA, estro de la E - centro en Poprad (Slovakio). Ili preparolis kelkajn aspektojn de kunlaboro en regionoj. Ni proponas al la legantoj la mallongigitan enhavon de la konversacio.

V.S. Mi havas al vi kelkajn demandojn pri via ideo krei Karpatian esperantistan ligon, kiu celus kunigi esperantistojn de diversaj landoj el Karpata regiono.

M.Z. Ĝi estas ne nur mia ideo, sed ankaŭ de Oszkar Princz, kiu nun estas sekretario de la Hungara E - asocio. Li opinias, ke kreinte la ligon, ni kunigos esperantistojn de la regiono kaj pere de esperantistoj ankaŭ la etnojn, loĝantajn en Karpatoj. Ni dezirus, ke ili kuniĝu sen akcentado pri nacio, ekonomia kaj politika situacio, nur respektante al homkvalitoj, kaj tiam ni konvikiĝos, ke ĉiuj homoj estas egalaj. Nin interesos ankaŭ ekologiaj problemoj de Karpatoj, ĉar la montaro ligas multajn landojn: Polion, Ĉeĥion, Slovakion, Ukrainion, Hungarion, Rumanion. Interesa estus kunlaboro inter tiuj ŝtatoj sur diversaj niveloj, ekzemple inter E - kluboj, rondoĵoj, folkloraj kaj muzikaj ensembloj k.t.p.

Ni povus okupiĝi pri la naturprotektado aŭ pri la ekologiaj problemoj en Karpatoj ĝenerale, konatigi la naciajn tradiciojn de la regiono. Pere de esperantistaj kontaktoj ni povas serioze kontribui la komunan reciprokajn kunlaboron.

V.S. Via ideo estas vere interesa. Mi proponas organizi kunvenon de la dezirantaj labori ĉi - direkte. Ĝi povus okazi ĉi - aŭtune en nia urbo Drohobyč, enkadre de la internacia E - renkontiĝo "Ĉekarpata aŭtuno". Ĉu ni povus kalkuli je helpo de la E - aktivuloj de la regiono?

M.Z. Certe. Estas bona propono, ja Drohobyč situas en la karpata regiono, kaj mi persone subtenos la aferon, ĉar jam venis tempo renkontiĝi kaj krei iun kolektivon, kiu aktivus kaj laborus en la sfero de mi menciita.

Mi pensas, ke tiu regiona agado estas tre grava, speciale en eŭropo, ĉar, kiel ni vidas, la t.n. eŭropa kunagado havas multajn problemojn: inter la landoj estas granda diferenco, ni dum jaroj ne tro kapablas kompreni unu la alian. Kunlaboro ne estas tiel progresas, kiel ni komence pensis. Estus pli bone, se aktive kunlaborus unuopaj regionoj, ekz. Skandinavio, Balkanoj, Adria regiono aŭ nia Karpata. Poste reprezentantoj de tiuj regionoj povus esti la eŭropan kunlaboron.

La rilatoj kaj vivkondiĉoj en la sama regiono estas similaj kaj homoj povas pli bone interkompreniĝi, ol en Eŭropo entute.

V.S. Ĉu povus la ligo okupiĝi ankaŭ pri aliaj aferoj?

M.Z. Jes, ĉar estas erare, ke esperantistoj sin fermas en la kadro de E - agado. Mi opinias, ke esperantistoj devas apliki siajn kontakteblecojn en ĉiuj sferoj de la vivo, en ĉiuj medioj. Kiam ni povos realigi niajn aferojn, ni povos diri, ke Esperanto uzeblas en ĉiuj sferoj kaj tiamaniere ĝi progresas.

V.S. Mi volus aŭdi vian opinion pri komercaj, kulturaj interŝanĝoj.

M.Z. Krom pura E - kunlaboro ni devas, kompreneble, fari ion alian, ekzemple ekkoni kulturajn tradiciojn de certa karpata etno, interŝanĝi tiun kulturajn valorojn, ĉar se ni pli bone konos unuopajn lokojn, ni pli bone komprenos nin reciproke.

La kultura sfero estas tre grava, sed ege gravaj estas ankaŭ la ekologiaj problemoj, ĉar nun ili tuŝas la tutan homaron kaj okupiĝi pri ili devas ne nur fakuloj. Se ni ne solvos saĝe la naturprotektadon, ni povos difekti la tutan venontan generacion. La naturprotektado ne estas problemo de unu nacio aŭ de unu ŝtato, sed nia ĝenerala problemo. Ni ne estas estroj de la mondo aŭ de la naturo, sed parto de la naturo, sen kiu ni ne povas ekzisti.

V.S. Koran dankon por la konversacio. Mi esperas, ke ni renkontiĝos aŭtune en Drohobyč kaj detale pridiskutos tiujn ĉi problemojn.



## VILAĜO, EN KIU NASKIĜIS TITANO



Proksime de Drohobyč troviĝas la vilaĝo Nahujevyči, kie naskiĝis unu el la titanoj de l' ukraina poezio - Ivan Franko (1856 - 1916).

Lia patro estis forĝisto. El la forĝejo de sia patro Franko prenis en la koron fajron por longa vivojoaĝo. Kaj tiu fajro brulis en la koro de l' poeto la tutan vivon, pleniĝinte ĉiujn liajn verkojn.

La talento de l' poeto estis multfaceta. Krom poezio li verkis prozon (rakontojn kaj grandajn novelojn), teatraĵojn, multe tradukadis, ĉefe el la antikvaj lingvoj kaj el la germana. Kelkaj volumoj de lia poezio prezentas preskaŭ la tutan historion de la antikvaj Grekio kaj Romio kaj de la malnova Rusjo - lando de la orientaj slavoj. Franko famiĝis ankaŭ kiel publicisto, literatura kritikisto kaj kiel elstara politika kaj sociaganto.

### Ivan FRANKO PROLOGO AL LA POEMO

#### "MOSEO"

Popolo mia, plenelturmentita,  
simila paralizan mizerulon,  
per moko kvazaŭ per la krust' kovrita!

Ne povas nokte fermi mi okulojn  
pro maltrankvil' pri via estonteco,  
pro honto, bruligonta posteulojn.

Ĉu vere estas via vivo - senco -  
fiksita fate sur tabul' el fero -  
nur sterki grundon por la fremdpotenco?

Ĉu efektive mankas ind - afero  
ke senlimecon de l' forteg' vi montru?  
Ĉu vi eterne restos sur la Tero

nur kaŝmalica, falshumila monstro,  
per rabo kaj perfido katenita,  
sen vol' per fort' rezisti kontraŭ?

Ĉu multaj koroj, bonmemoron indaj,  
je vi per am' plej sankta ardis vane?  
Kaj vane vivon estis oferintaj?

Ĉu al la lando, priverŝita sange  
per siaj filoj, malpermesos sorto  
paradi kun fier', libere, sane?

Ĉu tute sen bezon' en via vorto  
Fajreras sprit', mildec', impeto, ardo,  
al pens' povantaj doni decan forton?

Ĉu tute sen efik' en via kanto  
aŭdiĝas ĝem', konsol', esper', sopiro,  
sonora rido, plendoj de amanto?



Ho, ne! Ne nuraj larmoj kaj vespiroj  
as via sort! Mi kredas sav - eventon,  
je tag' de via el la tomb' eliro.

Ho, se mi kaptus trafe la momenton  
kaj dum la tiu trovus ĝustan vorton,  
sanigan, donacantan flam - impeton!

Se kreus kanton mi mistere fortan,  
ke milionojn ĝi flugigu kaj inspiru  
kaj ilin al benita voj' kunportul

Se mil... Sed ni, kun nia vant - aspiro,  
per duboj disŝiritaj invalidoj,  
ne rajtas gvidi vin al batalirol

En la naskiĝvilaĝo de la poeto troviĝas dediĉita al li muzeo. Ĉi tie estas restaŭrigita la gepatra bieno kun loĝdomo, stalo kun fojnejo, forĝejo. Ĉe la vilaĝrando en arbaro troviĝas "La vójeto de Ivan Franko", ornamita de lignaj skulptaĵoj, kiuj prezentas heroojn de liaj verkoj. Apude estis konstruita "Valo de fabeloj", kie ĝoje ludas infanoj inter lignaj fabelherooj de verkoj de fama poeto. Dum ĉiuj jarsezonoj venadas amantoj el Ukrainio kaj el eksteraj landoj al naskiĝloko de Ivan Franko.

Pluraj poemoj de Ivan Franko estas tradukitaj en Esperanto. Du el ili - "Himno" ("Eterna revoluciulo") kaj prologo al la poemo "Moseo" - estis publikigitaj en la multlingvaj poemkolektoj (Lviv, eldonejo "Kamenjar", 1986, 1989).

Sed venos temp', kaj vi kun arda vido  
en de popoloj sendependaj rondo  
ekbrilos de Kaŭkazo ĝis Beskido.

Disigos famon Nigra - Maraj ondoj  
pri l' liberec'. Vi - mastro hejmsolida -  
fiere vidos viajn kampojn, montojn.

Akceptu l' kanton, per angor' vinditan,  
sed kredo - plenan; drastan, sed sagacan;  
por la estont' - partpagon larmverŝitan,  
kaj por genio via - nupt - donacon.

1905


Tradukis Oleksandr KOROLEVIČ







## ĈEKARPATA AŬTUNO



Karpatoj... Dio dotis ilin per, abundaj, parte unikaj flaŭro kaj faŭno, freŝa aero kaj diafanaj riveroj, la homa fantazio loĝigis ilin per bonaj feoj kaj malicaj demonoj, provizis per senmobraj rezoroj, kaŝitaj en la tero de bonaj kavaliroj, la popola genio ligis kun ili neripetebajn legendojn, kantojn, fabelojn.

Ni veturas per aŭto tra serpumanta vojo. De ambaŭ flankoj - montoj, kovritaj per la pice - abi - faga arbaro. Sovaĝa, neeltenebla aromo! Ie for restas la urbobruo, malpura aero, homa vanteco. Post horo da veturado ni atingas la celon - karpatan vilaĝon Majdan. Ĉi tie aŭtune aperos la ukraina Esperantujo, bonvenigonta eksterlandajn gastojn por la internacia E - renkontiĝo "Ĉekarpata aŭtuno".

Ni eliras el la aŭto, kaj niajn okulojn frapas mirinde bela pejzaĝo. Ĉirkaŭe ĝis la horizonto leviĝas ŝtupe montoj, meze estas valo kun lago kaj insuleto.

Tuj ni laborigas nian fantazion: ĉi tie staras masto kun la verda flago. Vespere aŭ nokte insuleto povas servi kiel "insulo de amo". Ĝi estas facile atingebla per la arksimila ponto, de kiu eblas ĝui la ĉirkaŭaĵojn kaj kie eblos rendevui...

Nu, se rendevui, do certe en malpli rimarkeblaj lokoj, ekzemple en apuda manĝejo aŭ kafejo. Duonmallumo, bela meblaro, bonaj trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Sed, ĉu nepre ĉi tie? Ien kiel vokas, allogas al si ĉarmaj dometoj. En la parteroj - tri - kvartitaj, supre - du aŭ trilitaj ĉambroj. La dometoj situigis duonrondojn, iuj tute "perdiĝis" en la arbaro. Romantiko! Fuĝi de la tuta mondo kaj izoliĝi ĉi tie.

Sed ve, plene izoliĝi ne eblos. Okazos ja enhavriĉa Tago de la ukraina kulturo. Speciale venos ĉi tie ukraina kantista ensemblo "Sokoly". Ludos vere aŭtentikaj popolaj muzikistoj kaj okazos diversaj prelegoj, inter kiu la prelego pri ukrainoj kiel la plej antikva gento de

Eŭropo. Homoj agemaj, tre seriozaj povos partopreni la fondan konferencon de E - Karpatia Ligo aŭdiskuti pri la problemoj de la E - movado en la postkomunismaj landoj.

Restos kontentaj frandemuloj (okazos ja la tago de la ukrainaj naciaj manĝaĵoj). Eblus fiŝkapti, kolekti berojn kaj fungojn. Apudas rivereto, en kiu kapteblas trutoj, la kuiristoj preparos mirindajn fungomanĝaĵojn. En iu vespero la gastoj mem rostos por si ĉe la komuna fajro ŝaŝlikojn - speciale preparitan bovaĵon aŭ porkaĵon. Vegetarianoj ricevos "koŝeran" manĝaĵon.

Ĉiuj admiros vere mirindan karpatan

belecon kaj kelkaj maloportunaĵoj (ekzemple, eksteraj necesoj kaj lavejoj) certe ne malbonigos humoron. Des pli, ke ĉiu povos eluzi saŭnon aŭ duŝejon. Neniu enuos, ĉar okazos ekskursoj aliloken, perbusaj kaj perpiedaj.

La ĉirkaŭaĵo estas tre trankvila, senhuliganta. La aŭtoj de la gastoj estos gardataj. Multaj trovos, ke la loko similas al Alpoj, iuj, ke iun alian lokon. Sed fine ĉiuj konvinkiĝos, ke ĝi estas vere unika loko ne nur por la ukraina, sed ankaŭ por la internacia Esperantujo. Kaj multaj aspiras veni ĉi tien ankoraŭfoje.



Ukraina  
kantista  
ensemblo  
"Sokol"



## LA DOŬBUŜ - ROKOJ

Pli ol 270 km etendiĝas la 100 - 110 metrojn larĝa strio de ukrainaj Karpatoj. Kiu almenaŭ unufoje en la vivo admiris modestajn, sed samtempe ankaŭ majestajn pejzaĝojn de Karpatoj, neniam forgesos ilin.

Méze de la verdeblua karpata maro en la arbarparcelo Zalomy (regiono Ivano - Frankivsk) 600 m super la nivelo de la oceano himere umasiĝis la rokoj, kiuj mirigas per siaj dimensioj kaj formoj. Ili portas la nomon de Oleksa Doŭbuŝ, la plej populara gvidanto de opriŝkoj.

Opriŝkoj estis popolaj ribelantoj, batalantaj kontraŭ la ŝervuta jugo de feŭduloj en la okcidentsudaj regionoj de Ukrainio (Galicio, Transkarpatio, Bukovino) en la XVI - unua duono de la XIX jc. Ili atakis la kastelojn kaj bienojn de nobelaro kaj la rabajon (monon, vestaĵojn, provianton) dividis inter matriĉuloj.


En la juneco Oleksa Doŭbuŝ estis ŝervutulo. Protestante kontraŭ despotismo de sia mastro, li mortigas lin kaj fuĝas en la montaron, kie estras la taĉmentojn de opriŝkoj. Sub lia gvidado opriŝkoj efektivigis plurajn batalirojn.

La popolo atribuis al Doŭbuŝ multajn kavalirajn ecojn. Onidire, lin tuŝis nek kugloj, nek sabroj. Nur perfida kuglo, elpafita de la edzo de lia amatino Dzvinka mortigis lin.

Pri Oleksa Doŭbuŝ kaj opriŝkoj rakontas multaj legendoj. Ili rakontas ankaŭ pri la trezoroj, kaŝitaj de ili en Karpatoj. Multaj pitoreskaj lokoj portas la nomon de Doŭbuŝ.

La supremenciitaj rokoj estis la ripozloko de la Doŭbuŝ - taĉmentoj dum ilia bataliro al Drohobyĉ kaj Turka en 1744.


Tiu miriga naturkreaĵo estas grejsaj (sabloŝtonaj) rokoj 20-30 metrojn altajn, situantaj duonronde, kvazaŭ en gaja montardanco.





Pro sia karaktero la Doŭbuŝ - rokoj estis bona natura fortikaĵo. Tial ankoraŭ de malnovaj tempoj ili servis al homo kiel azilo de malamikaj atakoj kaj furiozantaj naturelementoj.

Malnovaj laĝantoj elhakis en la rokoj kavernojn, ĉirkaŭigis la rokojn per fosaĵo kaj remparo. La restaĵoj de konstruaĵoj ne konserviĝis, sed restis foldoj en rokoj, kien estis enmetataj solivoj. Tio atestas pri longa homrestado ĉi tie. Apartan intereson elvokas misteraj kavernoj, kiuj havas precizajn geometriajn formojn.



Oni supozas, ke la kavernoj en la rokoj dum diversaj tempoj estis uzataj de homoj diverscele: por paganaj ritoj, kiel azilo kontraŭ tataroj, kiel ripozloko por opriŝkoj.

La rokoj de Doŭbuŝ estas botaniko - geomorfologia rezervejo. Ĝia areo havas 100 hektarojn. La rokoj havas la statuson de la naturmemoraĵo kaj estas leĝprotektataj. Tiu ĉi belega loko altiras ĉiujare dekmilojn de turistoj.

La partoprenontoj de la internacia E-renkontiĝo "Ĉekarpata aŭtono", okazonta ĉi - jare (28.09 - 5.10), havas la eblecon ne nur propraokule ĝui la belecon de la rokoj, sed ankaŭ ripozi dum la tuta tago kaj pikniki opriŝke.



## UKRAINA TRADICIAJ FESTOJ

## VERTEPO

Nia gaseto planas konatigi niajn legantojn kun tradicioj de ukrainanoj, iliaj festoj, popolaj kaj etnaj kutimoj. Nuna artikoleto rakontas pri plej ĉefa vintra festo. Dum la Kristnasko en la tuta Ukrainio sonas belaj ritaj kantoj - koladkoj. Ili devenas el la pratempoj kaj primare gloris Koladon - la tutslavan diinon de l'ĉielo, patrinon de la Suno.

Laŭ legendo, Kolada ĉiujare en la plej longa vintra nokto naskas la filon Bojŭĉ - la novan sunon, la novan jaron.

Post la bapto de Ukrainio - Rusjo far la princo Volodymyr la Granda, okazinta en la jaro 988, koladkoj poe tape pleniĝis per novaj temoj, ĉefe pri l' naskiĝo de Jesuo.





La koladko - kantantoj, en grupoj de 5 - 10 aŭ eĉ pli da homoj, iradas de domo, al domo proklamante ĝojan novaĵon - la naskiĝon de l' Mesio, salutante la domgemastrojn kaj bondezirante al ili.

En la Kristnaska nokto reviviĝas eventoj de la komenco de la unua miljaro: ilin prezentas amatoraj aktoroj de la migranta folklorteatro, nomata "vertep". La tradiciaj rolantoj en la vertepo estas Paŝtistoj, tri Reĝoj, Anĝelo, Diablo, Morto, Herodo k.a. La ĉefa temo de tiuj teatraĵoj, prezentataj en loĝdomoj, estas

la Kristnasko. La vertepanoj portas "staleton" - majstre faritan maketon de la betlehema stalo, kie naskiĝis Jesuo, kompreneble kun la figuroj de Maria, Jozefo, eta Jesuo, paŝtistoj, bovoj kaj aliaj.

La gemastroj, dankante pro la teatraĵo, donacas monon, ofte regalaŭ vertepanojn. Gravan parton de la gajnita mono oni transdonas al preĝejoj, al kulturaj aŭ karitataj fondusoj.

Popolaj festoj dum Kristnasko estas la plej ĝojaj en ĉiu ukraina familio.

Počopo





## "LA MONDO ESTIS KAPTANTA MIN, SED NE KAPTIS..."

(200 jaroj post la morto de Hryhorij Skovoroda)

Hryhorij Skovoroda estis elstara ukraina filozofo, verkisto, pedagogo, kies verkaro ludis gravan rolon en la starigo de nova ukraina literaturo.

Li naskiĝis en la vilaĝo Ĉornuhy (Poltava regiono) en la familio de la malriĉa kozako. Lernis en la Kieva akademio, de kie elportis riĉan sciadon, precipe de la antikvaj kaj okcidenteŭropaj filozofioj kaj literaturoj. Dum do jaroj estis kantisto de la ĉekortega kapelo en Peterburgo. Kun la rusa misio Skovoroda vojaĝadis eksterlande (Hungari, Aŭstrio, Slovaki, Pollando k.a.). Instruis poetikon kaj etikon en kolegioj, estis hejma instruisto. Vivis tre modeste, ne strebis al altaj postenoj, kvankam la eklezia kaj laika potencoj multfoje tentis lin per gloro kaj abundo. Tiŝn li trafis respègulis en la sentenco, kiun testamentis skribi sur lia tombo: "La mondo estis kaptanta min, sed ne kaptis".

Dum la lastaj dudek kvin jaroj de la vivo Skovoroda migradis tra vilaĝoj, predikante per vorto kaj per ekzemplo de la propra vivo siajn ideojn. Li fariĝis popola "migranta universitato", akirinte eksterordinaran popularecon. Mortis en la vilaĝo Ivanivka (nun Skovorodynivka, Ĥarkova regiono).

Skovoroda kiel filozofo kaj verkisto estis por sia tempo enciklopedie erudita homo, kreis propran filozofian sistemon



kaj la sistemon de socipolitikaj kaj etikaj opinioj. Ĉefan lokon en la verkaro okupas la filozofiaj traktatoj, versaro "Ĝardeno de diecaj kantoj", la fablokolekto "Ĥarkovaj fabloj", en kiuj Skovoroda tuŝas la problemon de la homo, lia feliĉo, serĉado de la vojoj, kiuj kondukas al feliĉo de aparta homo kaj de la tuta popolo.

Skovoroda starigis la ideon, ke la feliĉo de l' homo troviĝas en la laboro, konforma al liaj naturaj inklinoj. La homo, laŭ Skovoroda, ne povas esti feliĉa, se li agas spite sian naturon. Ekkono de la naturo estas ekkono de la Dio. La Dio kaj la naturo estas la samo. En la naturo, instruas Skovoroda, estas du komencoj - spirita kaj materia. Li prilaboris la koncepton pri ekzistado de tri mondoj: senlima universo - makrokosmo, konsistanta el sennombraj apartaj mondoj, mikrokosmo, kiu estas

la homo, kaj simbola mondo de la Biblio.



Hryhorij SKOVORODA

### ALBELO KAJ KRABRO

(el "Harkovaj fabloj", mallongigite)

- "Diru al mi, Abelo, kial vi estas tia stulta? Vi ja scias, ke la rezultoj de via laboro ne tion al vi, kiom al la homoj estas utilaj kaj al vi ofte eĉ malutilas; alportante anstataŭ rekompenco la morton. Tamen vi ne ĉesas stulte kolekti la mielon. Multajn kapojn vi havas, sed ĉiujn sencerbajn. Videble, ke ĉiuj vi senpripense enamiĝis en la mielon.

- Vi estas granda stultulo, sinjoro konsilanto, - respondis la Abelo. - Ankaŭ la urso amas manĝi la mielon kaj la krabro ruze ĝin akiras. Ankaŭ ni povus ŝtelakiri, kiel iam nia kompanaro faras, se ni ŝatus nur manĝi. Sed al ni estas multe pli agrable kolekti la mielon, ol manĝi. Por tio ni estas naskiĝintaj kaj ne ĉesos ĝis la morto. Kaj sen tio vivi kaj ĝisate manĝi la mielon por ni egalas al morto.

Konkludo: La Krabro estas la bildo de homoj, kiuj vivas per la ŝtelado de fremdaĵo kaj naskiĝas ekskluzive nur por manĝi, trinki k.s. Kaj la Abelo estas modelo de la saĝa homo, kiu okupiĝas per konforma afero. Multaj krabroj senpripense diras: "Por kio studento

instruiĝis kaj nenion havas? Por kio do instruiĝi kaj ne havi abundon?" Ili ne komprenas, ke la konforma laboro estas la plej dolĉa festeno.

Kio, estas pli malbona, ol droni en abundo kaj morte suferi sen konforma laboro? Ekzistas nenio pli ĝoja, ol la vivo konforme al la naturo. Tiam dolĉas kaj fizika laboro kaj sufero de la korpo. Tamen necesas kompreni, kion signifas vivi konforme al la naturo. Tio ne estas la leĝo de nia besta lascivo, sed beata ekzistado en la konforma al vi parto. Tio estas la ekzistado, pri kiu antikva Epikuro diris: "Ni dankas la beatan naturon pro tio, ke ĝi faris la bezonataĵon facila kaj la malfacilaĵon nebezonata".

(Inter 1769 - 1774).

Elukrainigis Volodymyr PACJURKO

### DE LIBERTATE\*

Kio estas liber'?' la bono fora?  
Kelkiuj asertas: ĝi estas ora.  
Ho, ne estas ora: oro en potu  
Kun liber' kompare estas nur koto.  
Ho, se oni min stultulo ne faru,  
Ke ne perdu mi la liberon karan:  
Estu glor' eterna al viro - Titano -  
Patro de libero, heroo Bohdano. \*\*

Tradukis Andreo ROGOV.

\* - pri libero

\*\* - temas pri Bohdan Ĥmelnyckyj, ukraina hetmano, gvidanto de la liberiga milito de la ukraina popolo en 1648 - 1654; en 1994 oni celebras 500-jariĝon de lia naskiĝo



## UKRAINAJ VERKISTOJ EN LA ESPERANTO-MOVADO

Volodymyr PACJURKO

Iam, kiam mi gastis ĉe unu el pioniroj de la ukraina Esperanto - movado Lvovanino Izidora Vološčak, ekinteresis min unu karteto. Flaviĝinta de la tempo, kun la surskribo per krajono. Estis tio saluto el la fronto, finiĝanta per la vortoj "En la nomo de Dio mi alvokas vin disvastigi

Esperanton". Kaj la nomo de la skribinto: Vasyľ Bobynskyj.

En 1919 (per tiu dato estis datita la karteto) Bobynskyj estis ne nur siĉpafisto, sed ankaŭ poeto (samjare aperis lia unua poemaro "En vestiblo de l' templo").

Mi ne scias, kiam precize kaj kie esperantiistĝis Vasyľ Bobynskyj. Halicio, de kio li devenas, estis tiam centro de la ukraina E - movado, estiĝinta ĉikraŭ kolomea E - societo "Progreso" kaj la revuo "Ukraina Stelo", redaktata de Orest Kuzma. El inter liaj lernantoj poste formiĝis kelkaj verkistoj: Myroslav Irĉan, Ivan Tkaĉuk, Vasyľ Atamanjuk. Ĉi tiun kvaron - Bobynskyj, Irĉan, Tkaĉuk, Atamanjuk - ligis bela interna ideo de Esperanto. Ĉi tiu kvarono estis submetita al la stalinaj reprezalioj kaj ĉiuj (escepte de Tkaĉuk) estis mortpafitaj. Kiel "spionoj de la monda burĝaro", kiel "malamikoj de la popolo". Sed pri tio poste.

En la komenco, do, estis bela interna ideo, forta deziro fari ion por la popolo, suferanta sub la jugo de l' pola burĝaro. Serĉante la vojon por plenumo de la deziro, la entuziasmoplenaj halicianoj venas en la 30 - aj jaroj al Soveta Ukrainio (Myroslav Irĉan venis tien el Kanado, kien li elmigris antaŭe). Ĥarkiv, tiama ĉefurbo de Ukrainio, renkontis ilin per abundo de la verkistaj organizaĵoj. Ĉiu povis elekti laŭplaĉan. Multajn allogis "Pluĝilo" - organizaĵ de

verkistoj - vilaĝdevenaj. Ĝin gvidis esperantisto Serhij Pylypenko.

Ne estas do la miriga fakto, ke ĉe la organizaĵo, kiu nomiĝis "Pluĝilano" kaj kiu havis E - fakon, aperigantan E - librojn (bedaŭrinde, aperis nur du libroj: "La ruĝa kaptuko" de Andriij Holovko kaj "Fata morgana" de Myĥajlo Kocjubynskyj).

Estis tiutempe en Ĥarkiv aliaj interesaj verdkoruloj. Homoj amasiĝis ne nur ĉirkaŭ Pylypenko, sed ankaŭ ĉirkaŭ Mykola Borysov, homo ege kapabla, originala poeto kaj prozisto, malnova esperantisto. Ankoraŭ en 1914, kiel atestas "Enciklopedio de Esperanto", en Odesa aperis lia unua libro en Esperanto - "Intima parolad", poezio de ego - futuristoj, unika dokumento de futurismo en Esperanto. Proze li verkis novelaron "La hundo de Lia Majesteco". Borysov verkis ankaŭ ukrainlingve. En 1931 aperis lia romano "Kvint", verkita en stilo de aventurdetektiva filmromano, laŭ materialo de internacia laborista E - korespondado.

Nome Borysov ekhavis la ideon krei IAREV - Internacian Asocion de revoluciaj Esperantistoj - verkistoj. La centro de IAREV estis en Moskvo. La asocio havis sian revuon "La nova etapo (1932 - 1933, Moskvo), la asocio aperigadis siajn verkojn ankaŭ en la eldonejo EKRELO\* (Leipzig).

Al IAREV aliĝis pluraj ukrainaj verkistoj, inter ili la jam menciitaj Bobynskyj, Irĉan, Atamanjuk, Tkaĉuk, Pylypenko, krome: Vladimir Jurezanskij (verkinta ruslingve), Volodymyr Kuzmyĉ, famaj esperantistoj E. Izgur, E. Miĥalski, V. Polakov, S. Rublov, G. Sevak. k.a.

En la 30 - aj jaroj la centro de ukraina esperantistaro estis sendube Ĥarkiv. Ni menciuj la ukrainlingvajn lernolibrojn de



Internacia lingvo fare de J.Voleviĉ kaj S.Rublov, aperintaj en la ukraina ĉefurbo, esperantajn disaŭdigoin de la loka radiostacio. CK de la ukraina komsomolo per sia decido alte taksis Esperanton kaj rekomendis ĝin al vasta lernado. Multaj ukrainaj verkistoj eldiris siajn opiniojn pri la Internacia lingvo. Volodymyr Sosjura ( fama lirikulo) eĉ proponis uzi Esperanton por la interna komunikado en Sovetio anstataŭ la rusa. En la antaŭparolo al sia libreto "La morto de Janulans" P.Panĉ skribis:

"Naciaj lingvoj, satigante sian kulturon per vivaj sukcoj kaj per tio ĉi plialtigante ĝin, en la sama tempo malhelpas utiligi akirojn de aliaj kulturoj. Superreganta klaso kaj pli bonhava parto de la socio sentas tiun ĉi malhelpon malpli forte, ĉar ili havas eblon kaj rimedojn por ekposedi aliajn lingvojn krom la sia. En pli malbona situacio sin trovas la tutmonda proletaro. Dank' al sia ekskluziva situacio, ĝi ne havas ĉi tiun eblon. Sed la komuneco de intereso de l' laboristaro kaj malriĉa komparanaro de la tuta mondo postulas por interkompreno ankaŭ komunan lingvón. Ili opinias, ke nuntempe la plej taŭga por tiu ĉi celo estas Esperanto, kiu kiel lingvo distingiĝas de aliaj per sia eksterordinara simpleco de morfologio kaj gramatiko".

La mezo de la 30 - aj jaroj estis tempo de la disfuro de la personkulto de Stalin. La batalo kontraŭ la malamikoj de l' monda proletaro atingas sian apogeon. Denuncoj, provokoj, falsaj kulpigoj estis unuavice aplikataj al esperantistoj. Ĉiu arestita esperantisto aŭskultis stereotipan akuzon: "Vi estas aktiva membro de internacia spiona organizaĵo, kiu sin kaŝis sur la teritorio de USSR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio".

Kaj la sama steriotipa verdikto -

pafmortigo. Tiel pereis V.Kuzmiĉ kaj fama ukraina esperantisto V.Kolĉinskij.

La esperantistojn - halicanojn, venintajn al Ĥarkiv, oni akuzis pri la simila afero. Estis fabrikita afero pri UMO ( Ukraina militista organizaĵo), pro "aparteno" al kiu oni kulpigis la kvaron, pri kiu mi parolis en la komenco de la eseo. Ĉiuj ili apartenis al la literatura organizaĵo "Okcidenta Ukrainio", fondita en Ĥarkiv plejparte el la okcidentukrainaj verkistoj, enmigrintaj Sovetion. La sama sorto trafis ankaŭ aliajn membrojn de la organizaĵo.

Entute pro la stalinaj persekutoj pereis pli ol 500 ukrainaj verkistoj (80% de la tuta verkistaro).

La dokumentoj, kiuj atestas pri l' persekutoj de esperantistoj en la 30 jaroj, ne abundas. Prave skribis Ulrich Lins en "La danĝera lingvo", ke "nek la soveta registaro nek sovetaj esperantistoj publike eĉ konfesis la anatemon al Esperanto dum la periodo de "personkulto" - krom okazaj aludoj, ke la movado "longe stagnadis" aŭ ke difinitaj personoj "tragike mortis".

Ĝenerale, la temo pri l' partopreno de ukrainaj verkistoj en la E - movado estas preskaŭ ne studita. Reaperas nun la libroj de la verkistoj prisilentataj, (pli ĝuste: ĝis nun malpermesitaj), sed en iliaj biografioj oni ne mencias ligojn de la verkisto kun E - movado (ekz., reaperis la poemaro de V.Bobynskij).

Devo de la nuntempa generacio de la ukraina esperantistaro estas pogute kolekti necesan materialon pri l' martirologo de niaj antaŭuloj. Tion postulas justeco, tion postulas la historio.

---

\*Eldonkooperativo por revolucia Esperanto - literaturo. En EKRELO aperis la originale verkita de V.Kuzmiĉ novelo "Solidareco" kaj la rakontoj de P.Panĉ "La morto de Janulans", Kijuj tradukis S.Sinickij



## LA EKSPOZICIO MARŜAS TRA LA MONDO



Antaŭ kelkaj jaroj ne multaj eksterlandanoj sciis pri Taras Ŝevĉenko. Mi konvinkigis pri tio dum kelkjara korespondado. Kaj kielmaniere rakonti al ĉiuj interesantoj pri tiu multfaceta talentulo, fama poeto - demokrato, kaj pentristo, kiu multe faris por ukraina kulturo dum la tempo, kiam eĉ menciis pri Ukrainio estis malpermesite?.. Jen naskiĝis la ideo inter la samklubanoj de la EK "Arbara kanto" (u.Luck) organizi migrantan ekspozicion, kiun oni transsendu de klubo al klubo, de lando al lando. Dum unu jaro estis kolektita abunda materialo pri la poeto. E - tradukoj de la poemoj, reprodukaĵoj de lia artaĵoj, diversaj memoraĵoj (insignoj, poŝtmarkoj, BK, k.t.p.) eniris en 100 foliojn kun la rakonto pri destino de T.Ŝevĉenko. Eniris ankaŭ unika eksponaĵo - ĉefa verkaĵo de verso la

poeto "Testamento" tradukita en 150 lingvojn de la mondo inkluzive Esperanton. Kolekti la materialojn helpis samideanoj el EK - oĵ de Ternopil, Lviv, Kyjiv.

La solena prezentado de la migranta ekspozicio okazis en la Kulturdomo de u.Plovdiv (Bulgario). Dum dek tagoj ĉiuj dezirantoj havis eblecon konatiĝi kun la fondinto de la ukraina literaturo. Poste pere de la ekspozicio iom ekkonis pri Ukrainio francoj el Perigordo. Mi prezentis ĝin en Tuluzo, Avinjono dum mia vojaĝo tra Francio. Perpoŝte la ekspozicio venis en la germanan urbon Speyer, kie en gimnazio la aktivulo Franc Georg Rossler lukse organizis la prezentadon. Britio akceptis la ekspozicion en Chippenham kaj Londono. La klubo en Hispanio perdis la ejon kaj venis unua fiasko, sed reeĥis Portugala E - Asocio kaj hispanoj transdonis la ekspozicion al la Hispana - portugala Kongreso. Nun mi petis sendi la migrantan ekspozicion al la UK en Koreion, por ke multaj esperantistoj konatiĝu kun la plej interesa paĝo de la ukraina kulturo.

Ĉiuj dezirantaj aktivuloj povas mendi la ekspozicion por siaj aranĝoj, por organizi ukrainan vesperon, variigi siajn renkontiĝojn. La petojn bv. adresi al la E - Eldonejo "Bona koro", al

Niko VOLOŜYN  
pentristo



## PRI NIA MOVADO SKIZE

Mulfoje okazis en la historio de la homaro, ke nova "ismo" regis mensojn de ties adeptoj ĝis la venonta generacio. Kial?

Ĉar por tiu historiperiodo la situacio en iu konkreta teritorio (lando) bezonas ĝuste tiun "ismon", kaj tuj troviĝas homoj por ŝultraporti la ideon, semi ĝin sur la maturiĝinta tereno. Pasas oftaj bataloj, dramoj, venkoj, kiuj kutime puŝas la socian vivon certgrade alten kaj, elĉerpinte sin, mortas, restante nur en la memoro de posteuloj.

Respektive ĉi filozofion Esperant(jism)o lumas alie. Unue - ĝi ne koncernas difinitan landon aŭ pli ĝuste diri - ĝi koncernas laŭ sia ideo la tutan mondon.

Due - ĝi ne koncernas specialan intertempon de la historio aŭ pli ĝuste diri - koncernas la tutan homaran historion - ĉar la ideo ŝvebas de la pratempo. Ja stopkonstruata Babel - turo naskis tiun ĉi ideon.

Realigita konkrete en la lingvon Esperanton, la ideo certe diverstemple kaj diversloke evoluas alimaniere. Se paroli pri Ukrainio - eblas diri, ke ĝi ĉiam estis vere humoriĉa per humo por Esperanto - disvolviĝo. Tio koncernas socian, inteligentan, kulturalan, literaturan kaj organizan aspektojn.

De la organiza vidpunkto la unuaj burĝonoj de l' esperantismo en Ukrainio aperis en Odeso (1889), kie esperantistiĝis kaj organiziĝis inteligentaj homoj. Menciindas fortega Kieva E - klubo "Verda Stelo", fondita en 1907, kiu en jaro la 1913 organizis la II - an Tutrusian Kongreson de esperantistoj en Kievo.

En la 20 - aj jaroj Ukrainia E - organizo fariĝis parto de la Asocio de Esperantistoj de Sovetaj respublikoj (AESR).

En 1924 legitimigis la Tutukrainia Komitato de AESR, kiu tre aktive kaj vigle funkciis. Tiutempe multaj famaj ukrainaj verkistoj apogis Esperanton - V.Sosjura, O.Vyšnja, P.Panĉ, V.Poliščuk, I.Mykytenko, A.Holovko. Kelkaj iliaj libroj estas publikitaj en Esperanto.

En la 30 - aj jaroj la stalina teroro nuligis la Esperanto - movadon en la lando. Post la milito ĝi ekgrimpis en 1958 per fondiĝo de esperanta sekcio ĉe la Kieva Domo de sciencistoj.

En la 60 - aj plejparte junularo aktivigis la movadon. Fruktodone laboris la Sovetrespublikara Esperanta Junulara Movado (SEJM), en Ukrainio

UEJM.

En 1968 ĉe la Ukraina societo de amikeco kaj internaciaj ligoj oni kreis la Komisionon pri Esperanto. Escepte la eldonon de la bulteno "Tra Soveta Ukrainio" (17 numeroj) ĝi faris malmulton, ĉar estis altrudita desupre.

Fondita en 1979 la Ukraina Respublika filio de ASE iom, vigligis la movadon, ĉar baziĝis sur lokaj E - kolektivoj, malgraŭ ke ĝi ofte estis devigita orientiĝi al moskvaj instrukcioj.

Tre komplika socia kaj politika situacio estis en la lando kiam maje 1989 ukrainiaj esperantistoj kunvenis en Poltavo por la vica konferenco. Estis klare, ke URF ASE elĉerpis sin.

Tamen kiun vojon iri?

Plimulto jam komprenis ke venis tempo labori sendepende. Post akraj diskutoj pri konceptoj proponinto de la koncepto de la memstara Ukraina E - organizo E.Kovtonjuk estis elektita kiel la unua Prezidanto de la Ukraina Esperanto Asocio (UkrEA). La Konferenco transformiĝis en la fandan kongreson de UkrEA, malferminte novan epokon por la E - movado en Ukrainio.

De tiam la E - movado en Ukrainio evoluis nur bazante sin sur propraj povoj kaj fortoj. Multa laboro estis farita por oficialigi la novan sendependan organizon en la tiam ne sendependa respubliko.

En 1990 la 25 - homa delegacio de ukrainaj esperantistoj partoprenis UK - 75 en Habano (Kubo), kie UkrEA estis aliĝinta al UEA kiel la 51 - a landa E - asocio. La Komitato de UEA estis konvinkita fari escepton por Ukrainio el la regulo - "Unu lando - unu asocio".

Trairinte ne simplan vojon, spertinte krizojn kaj venkojn, UkrEA tamen elektis foje ĝustan vojon, kaj nun, festante sian 5 - jaran jubileon, paŝas antaŭen.

Tiu ĉi malloga skizo koncernas nur la organizan parton de la movado. Tamen plej interesa estas ĝia literatura kaj kultura enhavo, priluminda en sekvaj numeroj de "US". Ukraina esperantistaro forte aspiras kaj esperas, ke "US" fariĝos gvidilo por novaj adeptoj de nia kara E - (ism)o. "Ukraina Stelo" mem elfontiĝis el antaŭaj eldonoj, fariĝante pli bela, enhaviĉa, leginda, trovis sian senlakan mastron en la negranda okcidentukraina urbo Drohobyč. Prosperu ambaŭ!

Eŭgeno KOVTONJUK



## KONGRESO DE UkrEA

La 28 - 29 - an de majo en Ĉernihiv, la plej norda provinccentro de Ukrainio okazis la vica, 5 - a kongreso de UkrEA. Ĝi koincidis kun la kvin - jariĝo de la fondo de la tutlanda E - organizaĵo. Ĝin partoprenis adeptoj de la Internacia lingvo el 11 provincoj de Ukrainio /entute 24 provincoj/.

Enkadre de la kongreso okazis reelektio. Kiel prezidanto estis reelektita inĝ. Viktor Pajuk. La estraro nun estis plene novigita:

- O. Hryščenko /Luhansk/, komerca agado;
- M. Lineckij /Kyjiv/, instrumentodika laboro;
- O. Skobejeva /Ĉernihiv/, laboro kun junularo;
- M. Vološyn /Drohobyč/ eldonado, individua membraro;

La prezidanto respondecas pri informado kaj ekstera agado.

Granda atento estis dediĉita al funkciado de la E - eldonejo "Bona koro", kies prezidanto estas Vasyl Stanovyč. En la planoj de la eldonejo estas aperigo de instrua literaturo kaj beletra por konatigi la mondon kun Ukrainio, ĝia kulturo. Jam estas eldonita la ukraina "Ŝlosilo de Esperanto" en la kvanto 10000 ekz. La kongreso tutanime salutis reaperon de "Ukraina stelo".

La ĉeftemo de la kongreso estis serĉado de vojoj por plibonigi staton de la E - movado en la lando.

Menciindas bona organizado de la kongreso far s - ino O. Skobejeva kaj financa subteno de s-ro J. Zajdman el Jalta.

### ATENTONI!

La informilo de UkrEA "Helianto" estas "transplantita" el Luck al Drohobyč.

Peto al la abonantoj kaj simpatiantoj de la informilo ne plu sendi leterojn al Luck, sed ekde nun nur al Drohobyč, laŭ la adreso de la Ukraina E - eldonejo "Bona koro" (kun la indiko "por "Helianto").

## Novaj kursoj



Dum multaj jaroj bruletas esperanto movado en antikva urbo Drohobyč. Al nobla ideo de internacia lingvo aliĝas studentoj, oficistoj, laboristoj... En nia urbo funkcias amatora radiostacio. Pere radioondoj kontaktas kun la mondo Leonid Kolesnikov.

Antaŭnelonge startis novaj kursoj de Esperanto. Instruas lokaj spertaj esperantistoj kaj Volodymyr Pacjurko, kiun vi vidas sur la foto dum leciono.

La gazeto "**Ukraina stelo**" aperas kvarfoje en la jaro.

La jarabono por 1995 por Ukrainio - 100.000 karb.

Por alilanduloj - 30 gld.

Ĉi - jare aperos ankoraŭ unu numero. Ĝia prezo - 6 gld.

Mendojn por la gazeto ( N2 / 1994 kaj por 1995) sendu al la redakcio kaj monon bv. ĝiri al la UEA - kodo de la Ukraina E - eldonejo "Bona koro" **uueq - t** (Universala Esperanto - Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando).

La ukrainianoj bv. sendi la abonprezon per la poŝtmandatoj laŭ la adreso de la redakcio.



## **ATENTON!**

### ***Vi volas eldoni:***

- vian poemaron aŭ rakontojn;
- iun esperantologian verkon aŭ lernolibron;
- rememorojn pri via vivo en Esperantujo;
- ion ajn alian en Esperanto.

### ***Sed vi ne havas:***

- eldoniston;
- sufiĉe da mono;
- sperton en tiu afero k.t.p.

Bonvolu do vin turni al la **Ukrainia Esperanto - eldonejo "Bona koro"**. Ni plenumos vian mendon /redaktado kaj eldonado/ rapide, kvalite kaj malmultekoste.

### ***Venu, skribu, telefonu:***

Ukrainio, Ukraina Esperanto - eldonejo "Bona koro",  
str.P.Orlyka, 3 A, UA - 293720 Drohobyc̆  
/regiono Lviv/,  
tel. (03244) 2-23-48, tel - fakso (03244) 3-82-95

Prezidanto de la eldonejo Vasyl Stanovyĉ.

## TRADICIAJ E - RENKONTIĜOJ EN UKRAINIO

"LA HOVERLA - GRIMPADO" estas unu el la plej malnovaj aranĝoj de la ukrainiaj esperantistoj, organizata de la E - klubo el Ivano - Frankivsk printempe aŭ somere.

Hoverla estas la plej alta monto de la Ukrainaj Karpatoj kaj de la tuta Ukrainio (2061 m). Post la ascendo esperantistoj fiksis sur la montpinto la verdan flagon. La ĉi - jara grimpado okazos la 24 - an de aŭgusto - en la Tago de l' sendependeco de Ukrainio.

La sama E - klubo preskaŭ ĉiujare organizas LA NOVJARAN E - RENKONTIĜON EN JAREMĈE, pifoeska turisma urbeto en Karpatoj, ŝatata loko de skiantoj.

"VAZ" ("VINTRO APUD ZMUJIV") (Ĥarkova provinco) organizatas de lokaj esperantistoj kaj esperantistoj el Ĥarkiv. La lasta renkontiĝo okazis februare ĉi - jare. La partoprenintoj havis eblecon boĥe ripozi kaj aŭskultadi la E - aktivulon Anatolij Gonĉarov.

"ZBRUĈAJN RENKONTIĜOJN" organizas regule la E - klubo "Spinozofloro" el Ternopil. Ĝi estas gaja tendarumado sur la bordo de la rivero Zbruč (surlime de Ternopola kaj Ĥmelnicka provincoj).

"AROMA JALTO" estas renkontiĝoj, organizataj de la aktivulo V. Hordijenko, okazas en la fama krimea banurbo. Ĝi ofte enhavas esperantologiajn programerojn. La lasta okazis ĉi - jare printempe.

"ĈEKARPATA AŬTUNO", kiu okazas en Drohobyĉ, pretendas fariĝi la plej prestiĝa internacia E - renkontiĝo en Ukrainio pro sia riĉa kultura programo. Ĉi - jare okazos la dua renkontiĝo ( la unua estis en 1990).

En la Ukraina E - eldonejo "Bona koro" aperas unu el la plej belaj poemegoj de la fama ukraina poeto Taras Ŝevĉenko "**Servistino**" en kvar lingvoj: ukraina, esperanto, angla, germana kun antaŭparolo kaj komentoj. Bele ilustrita, kreta papero, ĉirkaŭ 80 paĝoj, formato 14x20 cm, prezo 12 gld.



## Humura pago




Ĉu vi scias, ke...

fama ukraina esperantisto s-ro V.Pacjurko (u.Pustomyty, regiono Lviv) ofte dum diskutoj diversteme venkas. Pro tio oni diras pri li: "Pacjurko ĉiam pravas". La redakcio de "Ukraina stelo" donacas al li pseŭdonimon Poĉopo.

talenta pentristo kaj esperantisto Niko Voloŝyn kun familio transloĝiĝis el urbo Luck en Drohobyĉ por konstante labori kiel ĉefa pentristo en "US" kaj E - eldonejo "Bona koro". De nun li manĝas "verdan" panon kaj sonĝas esperante.




plej bone, ĝuste kaj egale glaŝigas brandon Mykola Kryveckij el Ternopil. Li neniam drinkas malmulte. Invitu lin festestri. La adreson posedas la redakcio de "US"



eksprezidanto de UkrEA Eŭgeno Kovtonjuk (Kyjiv) ne tro aktivas E - movadon, ĉar li verkas multvoluman libron pri sia prezidantado.



prezidanto de UkrEA V.Pajuk fariĝis Stelo de TV kaj radio. Preskaŭ ĉiutage li propagandas Esperanton, eĉ perdis voĉon.



ĉe la E - centro en Drohobyĉ jam estis establita en kafejo "Verda krokodilo" fonduso "Rava fanto", de kiu oni povas senpage gustumi diversajn alkoholaĵojn el diversaj landoj. Specialaj boteloj estas por eterna komencantoj, barbuloj, belulinoj, profesoroj, stranguloj... V.Stanovyĉ invitas ĉiujn gustumi el "Rava fonto".





## Korespondi deziras

6 - jaraj fratoj - ĝemeloj Oleh kaj Nazar serĉas korespondantojn el tuta mondo. Temo: pentraĵoj, bildkartoj, ludiloj, infanlibroj.  
Adreso: Oleh kaj Nazar Vovk  
293720 Drohobyĉ /regiono Lviv/ str. Sambirska, 78 kv.34. Ukrainio. (Respondi helpas al ili patrino, avo kaj avino).

Natala Ĉernova  
343209 Slavjansk /regiono Doneck/  
str. Komjaĥova 51/25, Ukrainio

Viktor Kovalevskij /invalido/  
264920 Novovolynsk /regiono Volynj/  
str. sv. Volodymyra 13/42, Ukrainio

Natala Kalinkina  
270020 Odeso - 20  
str. 1905 roku, 35/4, Ukrainio

Esperanto - klubo "Eterna lumo" (29 - anĝi)  
330056 Zaporiĵja - 56  
str. Matrosova, 6 /4 etaĝo/  
Institut upravlinnĵa, Ukrainio

Ni turnis nin perletere al multaj geesperantistoj pri helpo al Ukrainia E-eldonejo "Bona koro". Iuj samideanoj reeĥis nian peton sendante revuojn, librojn, monon, respondkuponojn kaj entuziasmajn leterojn. Ni tute dankas al ĉiuj. Via eĉ modesta helpo ege

subtenis nin.

Via "briko" estas kuŝita en la fundamento de la eldonejo. Familnomoj de ĉiuj helpantoj estis publikitaj en informilo de UkrEA "Helianto". Pri sekvontaj subtenantoj ni rakontos en vicaj numeroj de "Ukraina stelo".



Geedza paro Taras /25 j./ kaj Oksana /24j./  
Stanovyĉ  
293720 Drohobyĉ /regiono Lviv/  
str. Hruŝevsjkoho, 56 kv. 44  
Temoj: ĵurnalismo, komerco, muziko, PM, BK,  
turismo, gastigado, aŭtomobiloj.







Al esperantistoj, vizitantaj Odeson, oni nepre montras la skulptaĵon de Zamenhof. Ĝi troviĝas en la urbocentro, en la korto de la domo, kie loĝis la esperantisto - skulptisto Genadij Blaĵkov, la aŭtoro de la skulptaĵo. Ĝi estas la ununura en Ukrainio monumento de L. Zamenhof.

La kopio de la skulptaĵo estis donacita al bulgaraj esperantistoj dum la 63 UK en Sofio.

Fotis Niko Voloŝyn

Esperantistoj, vojaĝantaj tra Ukrainio havas eblecon tranokti kaj ripozi en mini-hotelo ĉe Esperanto-centro en urbo Drohobyĉ. Lokaj esperantistoj volonte gastigas eksterlandanojn en siaj hejmoj, akompanas dezirantojn al najbaraj urboj kaj montaro, helpas decidi diversajn problemojn.

Ĉiuj vizitantoj ĝuos ukrainan gastemon.

**BONVENON!**



